

INTERNACIA FERVOJISTO



ORGANO DE I.F.E.F.

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

26a jaro

MAJO-JUNIO 1974

N-ro 3



Amikeca
babilado
inter
la reprezentanto
de la Hispanaj
Stataj
Fervojoj,
Direktoro
Fortuny, kaj
la IFEF Prezidanto

Kliŝo IFEF



Novaj vizaĝoj en la IFEF-estraro

En Tarragona forlasis du kolegoj la estraron, nome la kasisto Otto Walder kaj la redaktoro Per Johan Krogstie.

De 10 jaroj «deĵoris» Walder, dum Krogstie apartenis de 6 jaroj al la gvidanta gremio de IFEF. Nur homoj, kiuj konas la diversspecajn devojn en estraroj, kaj precipe en tiu de granda internacia organizaĵo kiel la nia, povas imagi, kion tio signifas: ses aŭ eĉ dek jarojn da estraraneco. Pro tio ankoraŭfoje ĉi-loke ni esprimas nian sinceran dankon pro tiu longdaŭra fidela kunlaborado. Ambaŭ ricevis modestan donacaĵon, kiu tamen nur simbole povas alludi la dankon de la federacio.



Samtempe ni salutas kiel novajn kunagantojn.

kiel kasiston Henning Hauge (Danlando) kaj kiel redaktoron Guy Delaquaize (Francujo).

Ambaŭ kolegoj meritas profundan dankon, ke ili disponigis sin por la federacio. Iliaj kvalitoj garantias bonordan laboron same kiel ni estas certaj pri daŭrigo de la ĉiam amikeca kaj fruktodona komuna laboro en la estraro.

En Tarragona la novelektita estraro promesis, ankaŭ estontece streĉi ĉiujn siajn fortojn, por ke la federacio daŭrigu prosperan vojon. En tiu senco ni iros en la estontecon.

Prezidanto.

GRAVAJ ENHAVAĴOJ

	paĝo	Resumo kaj Komentario pri la	paĝo
Ekstrakto el la protokoloj	35	Jar-raportoj	43
pri la Kunsidoj de la Kongreso		Kongresa Rezolucio	46
Raporto pri la 25a Kongreso	40	Administraj Informoj	47
		Nekrologo	48

INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO - FEDERACIO

Sekretariejo : E. Kruse, D-6 Frankfurt (M)74, Wienerstrasse - 121, GERMANIO
Redaktoro : Guy Delaquaize, 52, rue L.-Gandillet, 78420 Carrières/Seine, FRANCIO
Bankkonto : Thurgauische Kantonalbank, CH-8590 - Romanshorn, SVISIO

Ekstrakto el la protokoloj pri la publika Kunsido estraro/ Komitato (13.5) kaj plenkunsido (15.5) en la 26a Kongreso en Tarragona

La menciitaj punktoj de la tagordo troviĝas en IF 1/74.

A. Kunsido estraro/komitato

1. Malfermo

Komence Pr komunikas: LKK distribuis en stacioj de RENFE kaj en en urbo Tarragona 1000 afiŝojn ĉie videblajn (IFEF-afiŝoj). Kvarfoje LKK donis informojn al radio Tarragona, dissenditaj kelkfoje ankaŭ per aliaj radiostacioj, dufoje plenaj paĝoj kun bildoj, nomoj ktp en gazetaro, krome jam raportoj pri la kongreso. Dum alveno de «Esperanto-ekspreso» kaj dum solena malfermo ĉeestis televido.

Mandatkonstato

Ĉeestas 26 komitatanoj.

2. Raporto pri komitata laboro de la ĉefkomitato Greutert.

Li sendis 2 cirkulerojn kaj tuŝis diversajn problemojn. Plendis, ke ofte la decidoj de la komitato ne estas plenumitaj flanke de la komitatanoj, kio grave malhelpas la akuratan laboron. Mankas ankoraŭ la sekretarioj en la du komisionoj kaj multaj laŭstatutaj landaj kulaborantoj.

Pr dankas al la ĉefkomitato pro ties fidinda kaj ampleksa kunagado. Li multe helpis al la estraro.

3. Resumo de landaj raportoj

La kasisto laŭlegas la resumon pri 1973 de li verkitan. Ĝi aperos en IF. Pr aparte dankas al Otto Walder pro la longjara akurata verkado de tiuj resumoj, kio okazis nun lastfoje.

4. Rilatoj al aliaj organizaĵoj

Pr akcentas daŭran plibonigon de la rilatoj al FISAIC kaj atentigas je la fakto, ke la ĉeestanta oficiala reprezentanto de tiu internacia kultura organizaĵo, prezidanto de la belga FISAIC-sekcio, ne nur estas membro de nia belga IFEF-asocio, sed en sia salutparolado en la inaŭguro li klare diris, ke li estas esperantisto kaj eĉ

deklaris sin nia amiko. Ni sincere dankas lin pro tiu sintenado (forta aplaŭdo).

Rilatoj al UEA estas bonaj. Listo de la fakdelegitoj en IF ankoraŭ estos kompletigata. Pr urĝe petas, ke el inter nia membraro fariĝu multe pli delegitoj kaj fakdelegitoj de UEA.

Walder raportas pri la kontaktoj kun ITF (Internacia Transportlaborista Federacio) kiuj ĉefe estas informcelaj.

Pr ankoraŭ atentigas pri momentaj kvereloj en UEA pro la okazontaj komitat-balotoj, kies kaŭzo ŝajnas radiki ĉefe en la neŭtraleco de la Esperanto-movado-Li mencias, ke en la gazetara konferenco unu el la jurnalistoj el si mem (sen esti demandita) diris, ke la plej esenca eco de la E-movado estu ĝia neŭtraleco, sen kiu ĝi neniel plu povos esti agnoskata kiel iu ajn grava faktoro kaj li pravas. Ĉiu unuopa membro povas sin fiksi laŭ iu direkto politika, religia, sindikata, socia, sed la tuto nur povas atingi ion per nepra neŭtraleco. Tio ne signifas indiferentecon rilate al la nuntempaj problemoj, kiuj plejparte estas pli gravaj ol ĉiu politiko. Nia tereno cetere estas la lingvo. Ĉi-rilate ni (tio estas la esperantistoj) tute ne restu neŭtralaj, kaj sur tiu tereno ni ĉiuj havos pli ol sufiĉe da taskoj. Pr laste konklude pledas por tia neŭtraleco ankaŭ de IFEF, por ke ni en neniu lando trovu malfacilaĵojn ĉe niaj instancoj.

Fine Pr mencias, ke ankaŭ la komitatanoj B de UEA estas elektataj. Estas proponita kolego Greutert kiel unu el ili.

5. Kontaktkunveno kaj UK Hamburg 1974

Pr raportas pri la intencoj rilate al tiu kongreso. Ekz. DB oficiale de-

jorigos 6 membrojn de GEFA en speciala informejo. Pri la programo de la kontaktkunveno mardon, 30an de julio bonvolu legi en ĉi-tiu IF. Utiligu al vi la DB-informojn en la kongresejo.

La Ĉefkomitatano informas, ke nun en Hamburgo estos riceveblaj ankaŭ malmultekostaj loĝejoj je ĉ. 23 GM.

6. Laborplano

La prezidanto laŭlegas la tekston de kongresa rezolucio (vidu aparte). Unuanime akceptita per 26 voĉoj.

Pr laŭdas la informadon de diversaj landoj. Ni ne propagandu, sed konvinku per informado.

Ritterspach raportas, ke li trifoje havis okazon oficiale eluzi resp. apliki Esperanton en oficejaj medioj.

Hauge rakontas pri la novaj metodoj de DEFA rilate informadon, kiujn la danoj verkas partę nacilingvaj.

Pr indikas pri la Jugoslavia Fervojisto, kie aperas nun koncizaj biografioj pri gekolegoj, kiuj dum jaroj laboris por la jugoslavia asocio.

Li ankaŭ mencias germanlingvan Bultenon ekskluzive servantan por vasta informado en fervojistaj rondoj kaj ĉe sindikatoj.

D-ro Menabene petas la ĉeestantojn konferenci kun li pri la konata propono de la Socialdemokrata Partio de Italujo kaj li rekomendas prezenti la broŝuron de SPI (esperant-kaj itallingve) al sindikatoj, revuoj ktp.

B. Plenkunsido

1. Prezidanto salutas la ĉeestantojn kaj memorigas la mortintojn

— konatigas la definitivan nombron de la kongresanoj partoprenantaj = 648 el 17 landoj;

— mencias la akcepton flanke de la urbestro em Villanueva y Geltru (400 personoj);

— dankas ankoraŭfoje al la 3 bulgaraj aktoroj.

Mandatkonstato : ĉiuj 26 komitatanoj ĉeestas.

2. La sekretariino laŭlegas la alvenintajn salutleterojn kaj telegramojn.

3. Kongresraporto Aarhus akceptita unuanime (26 voĉoj).

4. Estraraj raportoj

4.1 Sekretaria raporto (IF 2/74)

Pr korektas kelkajn fuŝitajn ciferojn, nome sur paĝo 22 dekstre supre : Francujo 40, Aŭstrujo 27, Belgujo 25 ktp. Krome mankas kelkaj frazeroj sur paĝo 23. — Raporto akceptita = 26 voĉoj. La sekretariino aldonas al la raporto kelkajn klarigojn rilate la vojaĝon al kolegoj en Japanujo.

4.2 Redaktora raporto (IF 2/74) akceptita per 26 voĉoj. Pr klarigas la malfavorajn cirkonstancojn por la presado de IF en la lasta tempo.

4.3 La kasisto donas kasraporton, dankas al la kolegoj, kiuj ĉiam denove fortigas la fonduson por kolegoj el nepagipovaj landoj. Li klarigas, ke la elspezoj por estrarkunsidoj kreskis, ĉar por la kunsidoj tranoktadoj necesas, kiuj tamen nur parte estas kompensitaj al la estraranoj. Cetere estos plura plialtiĝo, ĉar ek de nun ĉiuj estraranoj partoprenos la kunsidojn (ĝis nun kutime mankis la redaktoro). Ankaŭ la listo de la fakprelegoj en la kongreslibro Aarhus kaj fotografado de la kongresembleoj kaŭzis iom da pliuspezoj. Sed entute la kasistato estas tute sana. Akceptita per 26 voĉoj.

Pr kore dankas al la kasisto menciante, ke apenaŭ estas imagebla la subtila laboro, kies rezulto estas tiuj malmultaj ciferoj.

4.4 Revizora raporto

Kolego Jüstrich deklaras, ke la laŭstatutaj postuloj estas plenumitaj kaj petas senŝarĝigon de la kasisto kaj de la tuta estraro.

Kasista kaj revizora raportoj unuanime akceptitaj per 26 voĉoj.

5. Raporto de Komisionoj kaj Komisiitoj

5.1 Terminara Komisiono raportas la gvidanto Ludoviko Sekereŝ.

5.2 Fakprelega Komisiono raportas anstataŭante Gernot Ritterspach.

5.3. Junulara sekcio raportas Gérard Horn.

5.4 Komitatanoj A kaj B de UEA, raportas la ĉefkomitatano por ambaŭ, ĉar D-ro Bácskai ne ĉeestas.

La raportojn pri 5.1 ĝis 5.4 bonvolu legi en IF.

La komitato akceptas la 4 raportojn unuanime per 26 voĉoj.

6. Konfirmoj

6.1 Komisionaj sekretarioj

Proponitaj estas en la Terminara Komisiono la jugoslavia kolego Jovan Ladjević, en Fakprelega Komisiono la germana kolego Otto Rösemann.

La komitato per 25 voĉoj konfirmas ilin, 1 sindeteno.

6.2 Junulara gvidanto

Lastmomente troviĝis posteulino por Gérard Horn en la persono de f-ino Mirella Merlani (Italujo).

Konfirmoj flanke de la Komitato per 26 voĉoj.

6.3 Honorigoj

Ĉi tiu punkto estas transprenita el la 1a kunsido (4).

Temas pri la ora medalo de Otto Walder, kies honorigo nur okazis post la unuaj komitatkunsidoj. La estraro elektis Walder laŭ Ĝenerala regularo al § 3 kaj petas nun la konsenton de la Komitato.

Unuanime akceptita per 26 voĉoj.

Paŭzo

7. Kongresproponoj (IF 1/74)

Antaŭe la prezidanto oficiale sciigas, ke nek IFEF nek iu alia organizo pagis eĉ ne parte la vojaĝon de la sekretariino al Japanujo. Necesas tiu komunikado pro diversaj kaŭzoj.

La prezidanto krome komunikas, ke la hispana landa asocio HEFA pere de kolego Ortiz starigis unuajn kontaktojn al portugaliaj kolegoj. Kaj li kaj la sekretariino daŭrigos la kontaktojn kun la celo, membrigi la respektivajn kolegojn kaj pli poste laŭ eble fondi landan asocion.

Propono n-ro 1

Schindler demandas, kio estas «sufiĉe frue» kaj petas la respektivajn informojn en la 6a numero de IF.

Pr respondas, ke intence estas uzita la esprimo «sufiĉe frue», la landaj asocioj, kies jarkunveno okazas ekz en printempo, nur povas liveri la datojn en printempo.

Akceptita per 25 voĉoj unuanime (mankas Gimenez).

Propono 2

Tiu propono jam estas traktita en la 1a kunveno. D-ro Bácskai estas elektita unuanime komitatano A de UEA.

Propono 3

Laborus kaj Ritterspach kontraŭas la proponon, ĉar ne ĉie eblas, ke familioj estas membroj de IFEF kaj pli grave estas instigo al vizito de kongreso ol iom pli plenigi la kongresan kason.

Pr legas la resp. punkton 17 de la kongresa regularo, kies ĉefa celo estas, plifaciligi al tiu persono en la familio, kiu devas pagi por si kaj por la aliaj, la financan flankon de la kongresa vojaĝo. Ankaŭ ne eblas kontroloj.

Voĉdono : 1 por, 21 kontraŭ, 3 sindetenas (1 mankas) = malakceptita.

Laŭ interkonsento en la dua kunsido Pr informas nun resume pri la decido koncerne la amendojn al fiksitaj proponoj : Estraro kaj komitato samopinias pri tio, ke principe oni ne faru amendojn. Tamen se dum la traktado evidentiĝas, ke pli bone konvenas al la federacio, amendi al la propono sen ŝanĝi ties esencon, amendo estas toleribla.

Se la proponinta landa asocio ne povas ĉeesti en kongreso, ĝi povas komisi alian landan asocion defendi sian proponon. Same la estraro ĉiam pretas defendi tiajn proponojn senpartie.

8. Budĝeto 1975

Temas

a) pri presado de IF en Francujo kaj

b) pri la aplikota transkalkula kuro so sfr al dana krono, pli klare : Ĉu 5 sfr estu kalkulataj je 11 aŭ 12 kronoj? Estraro proponas 12 por prokrasti antaŭvideblan kotizaltigon. Post ioma diskutado (Labordus, Gimelli) voĉdonado pri kurzo 12 kronoj : 14 por, 2 kontraŭ, 9 sindetenas (1 mankas).

Kurso 12 danaj kronoj akceptita.

Nova budĝeto estos prezentata.

9. Estrarelektio

La prezidanto enkondukas la ceremonion. Demisiis la kasisto kaj la redaktoro. La ĉefkomitatano transprenas la gvidadon de la kunsido. La elekto okazas skribe kaj sekrete laŭ § 23 (2).

Ĉiuj reelektitaj resp. novelektitaj estraranoj dicevas 26 voĉojn, nome Prezidanto : Joachim Giessner, Germanujo, Viceprezidanto : W. L. van Leeuwen, Nederlando, Sekretariino : Elfriede Kruse, Germanujo, Kasisto : Henning Hauge, Danlando, Redaktoro : Guy Delaquaize, Francujo.

La prezidanto dankas pro la fido. Li kore bonvenigas Hauge kaj Delaquaize kaj esprimas sian konvinkon, ke la estonta kunlaboro estos same amika kaj fruktoĉona kiel en la estinta estraro. Ni promesas, ke ni daŭrigos streĉi niajn fortojn por la federacio kiel ni faris ĝis nun.

Poste Pr adiaŭas la du demisiaranojn. Redaktoro havas tiklan taskon, devas elekti el materialo, plibonigi ĝin, ĉiam riskas iun insulti La prezidanto bedaŭras, ke li ne persone povas danki al la redaktoro Krogstie pro la sesjara amika kunlaboro.

Al Otto Walder li proksimume diras : Mian amikon mi povis observi dum multaj jaroj en lia multdirekta laboro. Ŝajnas, ke li havas plurajn kapojn kaj manojn, estas miraklo. Ekz. li liveris novajn ideojn por la statuto. Vortvorte li diras :

« Otto Walder estas persono, al kiu oni senkompromise povas fidi. Kiam

li transprenas taskon, oni povas esti certa, ke tio nepre funkcias. Kaj ĉio estas farita laŭ propra volo. Mi ne nur adiaŭas lin kiel prezidanto sian kaston, sed kiel amiko amikon. Tio estas la plej grava kion oni povas atingi inter homoj. »

Walder : La dek jaroj en la estraro estis feliĉaj jaroj. Dum mia kunagado kreigis 3 kolonoj de la federacio.

1. la komitato. Antaŭe ekzistis delegitoj, kiuj malaperis post la kongresoj. Nun la komitato laboras dum la tuta jaro.

Kaj apartenas al tiu kolono la estraro, kies internacieco ŝajnas al mi kontribuo al la firmigo de IFEF.

2a kolono por mi estas la aliĝo al UEA.

3a kolono estas la sana financa stato.

10. Elektio de kasrevizoroj

Danlando disponigas la tri revizorojn kaj la anstataŭanton.

Ili estas Knud Fisker, Eigil Sørensen, Anders Klausen kaj Robert Mikkelsen.

La komitato konsentas per 26 voĉoj.

Prezidanto dankas por la preteco de Danlando kaj al la kvar revizoroj.

11. Elektio de kongreslokoj

Por Aŭstrujo invitas Scharf/Stubnig la 27an kongreson al Villach. Stubnig donas kelkajn detalojn pri la loko.

Dato : 10.-16.5.75.

Por Svedujo invitas Rausek provizore al Skelleftea en 1976, antaŭvideble 12.-18.6.

Ambaŭ reprezentantoj jesas, ke ili antaŭe kontaktigis kun la respektivaj FISAIC-instancoj.

La komitato akceptas ambaŭ invitojn unuanime (26 voĉojn).

12. Varbado

de Jong tuŝas la malagraban membrisituation en Nederlando. Post resp. petoj envenis unu sugesto, kiu baziĝas sur la multnombraj allogaj eblecoj en nia movado. Ĉar precipe la skisemajnoj taŭgas pro junaj homoj, mi proponas ilin por persvadi neesperan-

tistojn tie partopreni. De Jong donas kelkajn detalojn kaj rekomendas pri-trakton de la plano.

Momente ne evoluigas diskuto. Pr iniciatas trakti la aferon en cirkulero de ĉefkomitatano.

13. Libera diskutado

13.1 La sekretariino informas, ke iu membro proponis fondi fonduson, en kiun povus enflui libervolaj donacoj por japanaj kolegoj, por ke iam kaj tiam ni povus plifaciligi al almenaŭ unu japana kolego la ĉeston en IFEF-kongreso.

E. Kruse
Sekretariino

J. Giessner
Prezidanto

La nova Redaktoro salutas vin...

Elektita en TARRAGONA kiel Redaktoro, mi konscias pri tiu honoro kaj samtempe, mi mezuras la taskon kiun vi transdonis al mi.

Dum jaroj, S-ro KROGSTIE prezentis tre belaspektan kaj interesplenan bultenon.

Fari pli bone, aŭ nur tiel bone, ŝajnas vere malfacila.

Mi ne estas spertulo kaj, malgraŭ la kompetenta helpo de mia amiko, S-ro Enizan, kelkajn erarojn vi trovos, eble...

Ne tuj pafu nin, mi petas; estu indulgemaj, almenaŭ dum kelka tempo... Dankon.

Krom tiu indulgemo, mi petas de vi,

Labordus : demandas pro proks. kostoj de tia rojaĝo. Sekretariino opinias, ke eble inter 2 ĝis 3 mil GM.

Prezidanto : ni studos kiel realigi la problemon. IFEF ankaŭ povus kontribui al la jubilea fonduso.

La sekretariino substrekas, ke tiu propono certe entuziasmigas ankaŭ la japanojn por akiri subtenon. Ĝis kongresfino jam estis enpagitaj loo sfr kaj 60 GM por la japana fonduso.

La prezidanto fermas la kunsidon.

karaj legantoj, helpon.

La bulteno estas la afero de vi ĉiuj, ĉar ĝi estas la ligilo de la IFEF-anoj.

Artikolojn, mi bezonas, sed bonvolu sendi nur tajpitajn tekstojn, bone redaktitajn, ne tro longajn (nia bulteno estas malgranda), kaj kiuj povus interesi ĉiujn, se eble kun fotoj (negativaj, preferinde).

Ankaŭ ideojn, proponojn, kritikojn, sugestojn, mi ne nur akceptas, sed deziras.

Ĉio povas esti utila kaj viaj leteroj kuraĝigos min.

Antaŭe, mi kore dankas al vi.

La redaktoro.

ATENTU!

Ni atentigas ĉiujn redakciojn, kiuj interŝanĝas kun ni siajn revuojn, bonvolu sendi viajn presajojn al la nova adreso : Delaquaize, 52 rue Gandillet-78420 Carrières-sur-Seine — Francio.

IFEF.



La urbestro de Tarragona bonvenigas la IFEF-Prezidanton.

Raporto pri la 26a Kongreso de INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO

Unue, KELKAJ CIFEROJ KAJ GENERALAJ INFORMOJ

Venis 648 viroj kaj virinoj el 17 landoj (kun 1 sola lingvo ESPERANTO) de la 11a ĝis la 17a de Majo 1974.

La invadita urbo estis TARRAGONA — Mediteranea Hispanio — 85000 loĝantoj.

La invadon helpis la speciala trajno « Esperanto-Ekspreso ».

La kongreso okazis sub la aŭspicioj de FISAIC (Internacia arta kaj kultura Fervoja Federacio), kiu subtenas nin; la ĉeesto inter ni de S-ro GILLES — belga reprezentanto — montrasion klare.

Subtenis ankaŭ la 26a, la RENFE (hispana ŝtata fervojo), la Urbo, kaj la Sindikato kiu afable disponigis la ĉarman sindikatan « Restadejon por Edukato kaj Ripozo », situata ekster la urbo, apud la marbordo.

Tie, inter floroj kaj arboj, ... Kongresejo kaj Loĝdometoj.

Subtenis ankaŭ la hispana Suno, kiu helpas toleri ĉiujn malfacilaĵojn.

Informado de la publiko estis abunda, per banderoloj, afiŝoj, radio-elsendoj kaj artikoloj en loka gazeto.

Jes, tiu kongreso estis riĉaspekta. Ĉi-sube, kelkaj el ĝiaj vizaĝoj... Laŭ via humoro aŭ karaktero, vi preferos tiun aŭ alian.

Ni komencu per :

LA SOLENAĴOJ

Tradicie, IFEF-Kongreso komencas kaj finas per solenaĵo.

Dimanĉe matene : la Malfermo de la Kongreso.

Sinsekve salutis, ĉu hispanlingve, ĉu esperante, elstaraj personoj :

— S-ro GIMENEZ

Prezidanto de LKK.

— S-ro RICARDO VILAR RIUZ

Urbestro de Tarragona.

— S-ro LOPEZ

Sekretario de la Provinca Estraro

— S-ro Kolonelo MURILLO

Reprezentanto de la milita provinestro.

— S-ro CEPEDO

Delegito de la Sindikato.

— S-ro FORTUNY

Reprezentanto de la ĝenerala Direkcio de RENFE.

— S-ro GILLES

Reprezentanto de FISAIC

— S-ro FIGUEROLA

Prezidanto de Hispana Esperanto Federacio

— S-ro MOLERA

Reprezentanto de UEA.

Poste parolis, tre koncize, la 17 IFEF-sekcioj.

Grava momento kiu ĉiam impresas la ne-esperantistajn oficialulojn. — 17 landoj, 1 lingvo... Tiam, la miraklo de Esperanto estas ankoraŭ pli evidenta.

Fine, la Prezidanto GIESSNER dankis la honorajn gastojn kaj LKK, kaj solene malfermis la 26an kongreson.

Dum tiu solenaĵo, ĉarmis nin agrabla surprizo : la Junulara Folkloro Muziko, regalis niajn orelojn kaj okulojn per sia entuziasma ritmo.

Jam, ĉe la komenco, hispana etoso kaj Esperanto bone kuniris...

Vendrede vespere : la Fermo de la Kongreso.

En la sama salono, post la tuttaga ekskurso, la lasta solenaĵo, fare de la Prezidanto GIESSNER, kiu, iom melankolie, dankis kaj adiaŭis ĉiujn.

Transdono de la Flago de Hispanio al Aŭstrio... Estas finite... Jam. Ĉiuj disiĝas. Ni ne forgesos la 26 an... Vivu la 27a! Ĝis revido en VILLACH.

Ĵaŭde : Akcepto ĉe la urbestro.

En belega ruĝa salonego de la Urb-

domo, delegitoj estis afable akceptataj de la Urbestro, kiu, post interŝanĝo de paroloj kaj donacoj, oferis honorvinon al ĉiuj.

Sed, solena, la kongreso ne volas esti tro; scivolema ankaŭ ĝi estis.

Jen :

— **LA VIZITOJ KAJ PROMENADOJ** —

Dimanĉe : Aŭtobusoj veturigis la kongresanaron ĉirkaŭ la urbo kaj poste al Sant Pau de Ordal, por inaŭguro de la riĉenhava nov-konstruita Esperanto-Muzeo kun posta regalado flanke de la komunumo.

Marde : alia ekskurso kondukis nin al Sitges kaj Villanueva y Geltru, kie interesa vaporlokomotiva ekspozicio povis esti vizitata.

Ankaŭ tie, afabla akcepto de urbestro kaj regalado.

Merkrede : tria ekskurso, suden, celis la viziton de la ĉarma malnova haveno Peniskola, kronita de malnova kastelo.

Laboris multe la foto-aparatoj en tiu rava loko.

Vendrede : fine la tuttaga ekskurso komencis per vizito al urbo San Sadurni kun vizito de la ĉampanketo Cadorniu. Ege interesa vizito kies agrabla momento estis la disdono, al ĉiu partoprenanto, de malgranda botelo de bongusta hispana ĉampanvino.

Poste la aŭtobusoj kondukis nin al la famkonata Montserrat, stranga kaj mistera nuda montaro kie monaĥejo trovis rifuĝlokon.

Tiu belega tago daŭris per la tagmango en urbo Valls, kun tipika hispana manĝaĵo kaj trinkado. Kiom da bruo... Entuziasma etoso baldaŭ regis, kvankam la fino de la kongreso estis tute proksima... en la kongresejo, post la reveno.

Eble vi kredas ke, dum la kongreso, oni nur promenadas aŭ amuziĝas? Eraro. Nun vi legu pri :

— **LA LABORKUNSIDOJ —**
KAJ LA SERIOZAJ KUNVENOJ —

La kongreso devas ankaŭ solvi siajn problemojn. Tio okazis en 2 komitat-

kunsidoj (1 ne publika kaj 1 publika) kaj en la plenkunsido (publika).

Estis lunde kaj ĵaŭde.

Krome okazis aliaj kunvenoj :

— lunde : fakprelega komisiono.

— marde : junulara komisiono kaj terminara komisiono,

Kvankam ne veraj laborkunsidoj, sed tamen tre interesaj, okazis la menciinda Fakprelego, lunde, kun temo : « Evoluado de RENFE dum la lasta jardeko » prezentita de José Cerezo.

Temis pri la 10 jarplano por modernigo de la hispana fervoja reto.

Fine, por la unua fojo, la kongreso oferis al ni Forumon. Bona iniciativo kiu kunvenigis kelkajn dekojn da intereso.

La celo estis faciligi intelektajn aŭ profesiajn kontaktojn inter la kongresanoj kaj la reprezentantoj de la gastiganta lando. Venis diversaj demandoj



La eksiginta IFEF-Kasisto, Otto Walder, dum la adiaŭaj vortoj.

pri la kulturo kaj ekonomia vivo de Hispanio, pri la Fervojoj kaj aliaj temoj.

Certe vi opinias ke oni devas ankaŭ havi festojn dum la kongreso. Vi pravas. Bonvolu trovi nun kelkajn informojn pri :

— LA DISTRAJOJ —

Dimanĉe : Riĉa programo prezentigis al la gastoj.

Nokte, sub stelplena hispana ĉielo, antaŭ la bele lumigita renesancstila urbdomo evoluigis unika folkloro vespero, kun dancgrupoj el Cataluña, gimnastikistoj, kantfloro kaj junaj atletaj viroj kiuj formis ĝis 6 etaĝajn hom-piramidojn.

Tiun programon la urba konsilantaro dediĉis al la 26a Kongreso.

Lunde : La Kongresa Bankedo kunvenigis avidajn partoprenantojn en « Las Palmeras », ĉarma gastejo kun marvida teraso.

Bona Vino + Muziko = Bonhumoro kaj baldaŭ regis varma etoso kaj vigla dancado.

La bruego tamen ĉesis kiam Sro Gilles, kun laŭdaj vortoj, transdonis oran FISAIC medalon al kolego Wal-

der, por honorigi liajn servojn en la IFEF-estraro.

Tre malfrue en la nokto kaj ĝis la sekvanta mateno daŭris la festo...

Marde : La Arta Vespero

La « Bulgara Esperanto Teatro Sofio » prezentis la 3-aktan komedion « La Rozoj » de Aldo de Benedetti.

La bulgaraj artistoj, jam famkonataj el pli frua kongreso, rikoltis tre meritan aplaŭdon, pro sia elstara prezentado.

Ni esperas revidi ilin.

Ĵaŭde : Fine, la Junularo, kies preferata kongresejo estis proksima marbordo kunestadis ankaŭ per pikniko, per futbolmaĉo inter CF-Tarragona kaj IFEF-Teamo, ludoj kaj teatraĵoj, kiujn sekvis la Junulara Balo.

Jen, kelkaj facetoj de tiu prismo, la 26-a IFEF-Kongreso.

Sunplena, gaja, frata, ankaŭ grava pro la atingitaj laborceloj, tia ĝi estis, tia ĝi restu en niaj memoroj. Kaj ni ne forgesu la Post-Kongreson en Callela...

Al la hispanaj kolegoj kiuj penadis, ni ree sendas niajn elkorajn dankojn kaj salutojn. LA REDAKTORO.



Studantoj de la laborista universitato Tarragona ĝojigas la gastojn de la Kongresa inaŭguro per sia gaja ludado

Resumo kaj Komentario pri la jar-raportoj de la landaj asocioj de INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-FEDERACIO IFEF 1973

Sendube ankaŭ sen raportado nia federacio, vivus kaj progresus. Tamen, ankaŭ por aktivuloj, por kiuj valoras ĉefe la estonteco, decas foje fari halton kaj pezi, kiel la propraj aktivecoj efikis. La raportoj pri 1973 laŭnhave grave plibonigis; gratulon al la verkintoj. Kun malĝojo ni konstatas, ke jam de 3 sinsekvaj jaroj mankas raporto el Bulgarujo.

Denove la membraro kreskis je 67 membroj, dank al progresoj en Aŭstrujo, Belgujo, Francujo, Germanujo, Hispanujo kaj dank al fondiĝo de landa asocio en Japanujo.

Krom aktivaj membroj niaj landaj asocioj listigas ankaŭ pasivajn membrojn. La nombro de IFEF-aktivuloj estas 2919, la tuta membraro nombras 4280 gekolegojn.

21. Landaj estraroj, membraro, organoj.

21.2 Estraroj. Denove minimumo da ŝanĝoj en la estraroj pruvas la fidelecon de niaj gvidantoj.

21.2 Organoj.

12 el niaj landaj asocioj eldonas propran organon.

En la nacia esp.-gazeto disponas pri unu paĝo : Ĉeĥoslovakujo. Norvegujo.

En la fervojista hobia gazeto disponas pri loko : Finnlando.

Ne disponas pri organo : Hispanujo, Polujo, Rumanujo, Svedujo.

23. Evoluoj de rilatoj kun instancoj kaj aŭtoritatoj.

23.3 Rilatoj kun la centroj de kulturaj organizaĵoj (FISAIC).

Tiajn deklaras kiel « tre bonaj » : Aŭstrujo, Francujo, Norvegujo, Danlando kaj Italujo.

La rilatojn kiel « bonaj » taksas : Belgujo, Finnlando, Germanujo, Ju-

goslavujo, Nederlando, Svedujo, Hispanujo kaj Svislando.

Ne ekzistas rilatoj en Britujo kaj Japanujo kaj ne ekzistas FISAIC-tegmentorganizaĵoj en Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo, Rumanujo.

Polujo : esperantistoj formas la solan FISAIC-sekcion en socialismaj landoj.

24. Kunlaboro/Rilatoj kun aliaj esperantistaj organizaĵoj.

24.1 Rilatoj kun neŭtralaj esp. organizaĵoj.

La kunlaboron kiel « tre bona » taksas : Hungarujo, Italujo, Jugoslavujo, Norvegujo, Rumanujo, Svislando.

« Bona » estas la kunlaboro en Aŭstrujo, Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Finnlando, Francujo, Svedujo. En Germanujo vastaj, bonaj kontaktoj.

Kontentiga stato en Hispanujo.

Sole pere de unuopaj anoj rilatoj ekzistas en Britujo kaj sole per raporto al la landa gazeto en Japanujo.

24.2 Rilatoj kun naciaj SAT-asocioj.

Apogantoj de SAT estas : Belgujo, Norvegujo.

Nur unuopaj membroj aniĝas en : Danlando, Germanujo, Finnlando, Svislando.

Malmultaj kontaktoj : Francujo. Ne niaj kontaktoj : 10 landoj.

24.3 Kunlaboro kun aliaj naciaj esp. organizaĵoj.

Kun fakaj esp. organizaĵoj kontaktas : Belgujo, Finnlando, Germanujo, Svislando.

Kun esp. junularo agas : Danlando. Kun apartaj organizaĵoj rilatas : Aŭstrujo, Francujo, Hispanujo.

En tutlanda tegmenta organizaĵo aktivas : Nederlando.

25. Informado.

25.2.0 Publikaĵoj de gazetartikoloj pro niaj klopodoj.

Pruveblaj artikoloj aperis : 381 (1971 = 331, 1972 = 270).

Pleje sukcesis :

1. Germanujo 115 artikoloj
2. Danlando 112 (kongreslando)
3. Svislando 54 artikoloj
4. Svedujo 15

25.2.01 Aplikado de la kongresa gazetara servo (Aarhus).

En 14 landoj la bultenoj uzigis por 42 raporto al redakcioj kaj administracioj. Pléj vasta aplikado en kongreslando Danlando.

25.2.02 Rimarkoj pri la gazeta servo.

Laŭdaj mencioj : 8 Landoj sen komentario : 10 Landoj.

Hungarujo proponas verki pli abundajn bultenojn. Germanujo atentigas pri manko de informoj pri la lasta kongrestago.

25.2.03 Apliko de la kongresa rezolucio.

La rezolucia teksto estis menciita en raporto de asociaj organoj : 4 — al fervojaj instancoj : 4 — al sindikataj gazetoj : 4 — al lokaj gazetoj : 2 — al esperantistaj gazetoj : 3.

Danlando uzos la tekston en eldona varbbroŝuro.

Nenian reagon rilate la rezolucio mencias 9 landoj, 4 ne respondis.

Sola efiko en Svislando, flanke de privata fervojo kaj la turisma centro.

25.2.1.1. Publikigo de la faka prelego DSB kiel ŝipkompanio en Aarhus.

La tuta teksto publikiĝis en « Internacia Fervojisto » kaj « Tamen » (belga).

En Esperanta-gazetoj aperis resumoj : 3, mencioj : 11.

25.2.1.2. Publikigo de la faka prelego « Eŭropa fervoja politiko en la komuna merkato », de d-ro W.Bormann.

La tuta teksto publikiĝis en « Internacia Fervojisto » kaj « Tamen » (belga).

En Esperanto-gazetoj aperis resumoj : 4, mencioj : 8.

En fervojistaj revuoj aperis resumoj : 2, mencioj : 16.

En aliaj gazetoj aperis mencioj : 3.

Cetera utiligo : Germanujo : teksto sendita al 18 fakestroj.

25.2.1.3. Fakprelegoj dum grupaj, regionaj, landaj kunvenoj.

Belgujo : 2 prelegoj dum jarkunveno. Ĉeĥoslovakujo : 2 prelegoj dum grupkunvenoj.

Germanujo : 1 prelego dum jarkunveno, de ambasadoro R. Harry, pri : « Historio kaj evoluo de la trafiko en Aŭstralio ».

Hungarujo : d-ro I. Bacska : « La Metro de Budapeŝto ».

d-ro M. Szegedy : « La signifo de konteneroj en la fervoja transporto ». Jugoslavujo : en kadro de Somera Universitato de 58a UK en Beograd : G. Sredič : « Ekonomieco de transporto de varoj en konteneroj ».

Dum fervojista tago : Inĝ. L. Sekereš : « Integra transporto ».

25.2.2. Agadraporto al la fervoja administracio.

1-foje jare sendis : Belgujo, Ĉeĥoslovakujo, Hispanujo, Jugoslavujo, Norvegujo, Polujo, Svislando.

2-foje jare sendis : Italujo

5-foje jare sendis : Germanujo.

Informado pere de fervojista gazeto : Danlando, Finnlando, Francujo, Nederlando.

Pere de « Internacia Fervojisto » : Japanujo.

Reagoj favoraj : Belgujo, Hispanujo, Italujo, Jugoslavujo, Norvegujo.

Nenia reago : Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Svislando.

Germanujo : 4 aranĝojn partoprenis fervojaj reprezentantoj.

25.2.2. Agadraporto al la fervojaj sindikatoj.

1-foje raportis : Aŭstrujo, Italujo, Jugoslavujo, Norvegujo, Polujo.

2-foje raportis : Hungarujo, Svislando.

5-foje raportis : Germanujo

Informado per fervoja gazeto : Finnlando.

Preparos raportadon 1974 : Francujo
Nenia reago : Italujo, Svislando.

Favora reago : Belgujo, Jugoslavujo, Norvegujo, Germanujo, Polujo.

Germanujo : partoprenis sindikataj reprezentantoj en 4 aranĝoj. Sindikatoj aktive subtenas varbadon por Esperanto.

25.2.3. Informado en deĵorejoj.

Sendado de varbiloj al ĉiuj deĵores troj : Aŭstrujo, Germanujo.

Informado per afiŝoj kaj informiloj : Ĉeĥoslovakujo, Danlando, Hispanujo, Japanujo, Polujo, Svedujo, Svislando.

Informado per fervoja gazeto : Francujo, Germanujo, Nederlando.

Nur persona varbado : Belgujo.

25.2.4. Nacilingvaj radioprelegoj kaj televidprezentadoj.

Aŭstrujo : Okaza kunlaboro en la radio-elsenda fako.

Hispanujo : 3 radio-intervjuoj rilate IFEF-kongreso Tarragona.

Jugoslavujo : 1 intervjuo rilate IFEF-kongreso Aarhus.

Svislando : 2 radio-informoj, 1 televid-elsendo.

25.2.5. Eluzo de enketo pri « Stato de la pensiuloj ».

La teksto sole pritraktiĝis en :

Danlando : ni tradukos kaj uzos la materialon.

Francujo : nuntempe pritraktas la enketon.

Germanujo : la sindikatoj montras grandan intereson por tiu laboro.

Nederlando : esploros uzeblecojn.

25.3 Okazigo de ekspozicioj.

po 1 ekspozicion organizis : Danlando, Hungorujo, Nederlando, Svedujo
Norvegujo kune kun la neŭtrala landa asocio.

2 ekspoziciojn aranĝis : Belgujo, Polujo.

3 ekspozicioj prezentigis en Germanujo.

La nombro da vizitintoj estis : en

Belgujo 400, en Danlando 1.200, en Germanujo 1.200, en Svedujo 2.000, por la komuna norvega 15.000, entute 18.600 homoj.

25.4 Distributado de varbiloj.

Disdoniĝis :

afiŝoj	2.980
flugfolioj	17.200
varbbroŝuroj	3.180

entute 23.360

(1971 : 1.000 — 1972 : 4.000)

(1971 : 13.500 — 1972 : 3.300)

(1971 : 2.500 — 1972 : 7.200)

(1971 : 17.000 — 1972 : 14.500)

25.5 Jarkunvenoj de la landaj asocioj.

15 asocioj aranĝis jarkunvenojn kun entute 728 partoprenintaj membroj kaj 66 eksterlandaj gastoj.

Plej bone vizitataj :

Germanujo : 145 partoprenintoj, reprezentitaj 9 landoj.

Francujo : 118 membroj + 40 eksterlandaj gastoj.

Riĉajn programojn kun prelegoj kaj ekskursoj prezentis : Aŭstrujo, Francujo, Germanujo, Nederlando.

28. Terminara laboro.

a. Laboro por uic-leksikono estis farita en : Finnlando, Germanujo, Hungarujo, Jugoslavujo, Rumanujo, Svedio, Svislando.

b. Terminareton jam eldonis :

Hungarujo, Jugoslavujo, Nederlando, Norvegujo, Germanujo.

Manuskriptoj pretaj : Danlando, Finnlando, Svedujo.

Manuskripto en laboro : Francujo (por 1976), Rumanujo (por 1974).

Elektiĝis komisiitoj : Japanujo.

c. Tradukado de internaciaj konvencioj : Francujo mencias reviziadon.

101. Diversaĵoj.

Aŭstrujo — Klopodoj por presigo de la klarigoj en la horaro. Senrezultaj.

Fino paĝo 48.

Fakprelego

La Fakprelego aperos en la venonta bulteno, sed, ek de nun, vi povas peti laŭbezone la resumon ĉe S-roj RITTERSPACH aŭ BRANDENBURG.

Kongresa Rezolucio

La 26-a kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEFF), okazinta en Tarragona (Hispanujo) kun 648 partoprenintoj el 17 landoj,

- notas, ke la luktado sur lingva tereno daŭre pli akriĝas kaj ke kelkaj potencoj pli kaj pli intense pligrandigas siajn lingvajn influojn,
- konstatas, ke tiaj metodoj kondukas al lingva diskriminacio por sen nombraj popoloj kaj minoritatoj, kio kontraŭas la Ĉarton de la Homaj Rajtoj,
- atentigas, ke en medioj de fervojaj administracioj regas sama diskriminacio, ekzemple en ĉiuj internaciaj konferencoj, simpozioj, teknikaj

- kaj kunvenoj same kiel en internaciaj reglamentoj pro uzo de nur unu aŭ malmultaj « laborlingvoj »,
- rekomendas arĝe klopodi, ke helpe de taŭga, neŭtrala lingvo tiu diskriminacio estu evitata en fervojaj kaj sindikataj medioj, kiuj ambaŭ apartenas al progresaj fortoj,
- proponas utiligi por tiu celo la praktike elprovitajn internacian lingvon Esperanto,
- petas la fervojajn kompaniojn kaj sindikatojn kiel eble plej baldaŭ kunvoki internacian konferencon, por solvi ĉi tiun ne plue toleran staton en la intereso de la fervojaj entreprenoj, klientoj kaj de la fervojistoj mem.

IFEFF.

Ora Medalo de la FISAIC por Otto WALDER

La plej altan honorigon, kiun povas doni la Internacia Federacio de kultur-flegantaj fervojistoj (FISAIC), la oran medalon, ricevis nia eksiginta estraro Otto Walder (Svislando) en la kongreso de Tarragona. Plene li meritis tiun distingon, kiu ĉefe estas donata pro laboro en internacia kultura medio. Walder, kiu jam de 41 jaroj estas esperantisto, precipe en la pasintaj 14 jaroj laboris en la fervojista movado, el ili 10 jarojn en la IFEFF-estraro kiel ties vicprezidanto (1964-1968) kaj kasis- (1968-1974). Li estis vicprezidanto de

LKK dum la neforgesebla IFEFF-kongreso de Zürich (1955) kaj tute memkompreneble tuj helpis, kiam subite necesis organizi la 24an IFEFF-kongreson en Lugano. Sed krome li transprenis multnombrajn aliajn taskojn, ĉiam fidinda, ĉiam helpema. Ĉiam bona amiko. Kore ni gratulas al li pro la alta distingo. Li ricevis la medalon el la manoj de la oficiala reprezentanto de la FISAIC, Georges Gilles, prezidanto de la belga FISAIC-sekcio.

PREZIDANTO.

ADMINISTRAJ INFORMOJ Korektaĵoj por IF n-ro 2-1974

1. En la jarraporto de la sekretario por 1973 bonvolu korekti jenajn erojn, kiujn ne kulpas la sekretario :

Sub « membroŝtato » la ciferoj tekstas :

« Francujo = 40, Aŭstrujo = 27, Beljugo = 25 » ktp paĝo 23-4a linio post « veterana kunveno » oni daŭrigu :

« Alia dana emerita kolego, Johano Christoffersen, ricevis la arĝentan medalon de FISAIC » ktp; paĝo 23 dekstre lasta alineo en la dua linio malantaŭ la jarnombro 1973 mankas « IFEFF ».

kaj korektu en la lasta linio « pozicio ».

2 - Renkontiĝo de la fervojistoj en Hamburg

De la 27a de julio ĝis la 2a de aŭgusto 1974 okazos la 59a Universala Kongreso de Esperanto en Hamburgo (Federacia Respubliko Germanujo). Kiel jam tradicie en UK estos antaŭvidita kontaktkunveno por ĉiuj kongresantaj fervojistoj. Tiu kunveno estos mardon, la 30an de julio kaj nomiĝos « Renkontiĝo de la fervojistoj ». Ĝi havos allogan programon, kiun ni ĉiube publikigas :

8.30 :

Foriro de la kongresejo, veturo per urba fervojo al Hamburg-Altona.

9.00 :

Renkontiĝo en la granda salono de la fervoja direkcio, kiu situas vid-alvide de la stacio Hamburg-Altona, akcepto, fakprelego « Kion vi ankoraŭ ne sciis — pri la fervojo », poste veturo per omnibuso al bele situanta restoracio apud la rivero Elbe, tie komuna tagmanĝo.

13.30 :

Enŝipiĝo kaj vizito de diversaj treege interesaj lokoj de la grandega haveno de Hamburgo, nome la kontenera terminalo kaj du tute novaj, modernaj pontoj, krome veturo tra vastaj partoj de la haveno. Reveno je la 17.00 h. Prezo de la tuta ekskurso inki. tagmanĝo : 13 GM.

La kuponojn por la ekskurso oni ricevos ĉe la oficiala informejo de la Germana Federacia Fervojo en la kongresejo, kie dum la tuta kongreso (escepte 1.8.) deĵoros membroj de GEFA.

Tie oni ankaŭ povos havi ĉiuspecajn prifervojajn informojn, biletojn, rezer-

vilojn ktp. Nepre post via alveno en Hamburgo anoncu vin en tiu informejo, ĉar la nombro de partoprenantoj en la ekskurso estos limigita.

GEFA-sekretarioj.

3. - Edziĝfestoj en Maribor

Kiu ĉeestis en februaro ĉi-jare la skisemajnon en Maribor bone memoras nian organizanton

Jovan Mirković

kaj la kasistino Kristina Pevec

Kiel ni hazarde eksciis, ili geedziĝis en aprilo.

Ni kore gratulas al la simpatia paro kaj deziras, ke ili ankaŭ estonte en ilia privata vivo tiom harmonie kaj modele kunlaboros.

4. - F.E.R.N. Komunikas

La F.E.R.N. jarkunveno okazos je la 14a kaj la 15a de septembro en Breda (urbo en la suda provinco de nia lando).

Je la unua tago okazos ekskurso kaj festmanĝado; je la dua, la labor-kunsido.

Informojn kaj aliĝojn ĉe la Sekretario de F.E.R.N.

W. van Leeuwen.

5. - Last minute...

Last minute ni eksciis, ke en la internacia horaro de la Danaj Ŝtatservoj nun ankaŭ troviĝas la klarigoj por pasaĝeroj en la internacia lingvo Esperanto (paĝo 14). Gratulon al niaj danaj kolegoj !

NEKROLOGO

Germanujo

Terura malsano forrabis en Regensburg neatendite la 21an de aprilo nian fidelan membrinon

Anna KAPPEL, 60 jaraĝa

Ŝi partoprenis en multaj kongresoj kaj estis konata ĉiam bonhumora kaj vivoplena.

Ni konservu al ŝi bonan memoron!

La duan fojon la sorto trafis la distrikton Regensburg. La 26an de aprilo, daton de sia 66-a naskiĝtago, forlasis nin nia ĉie kiel « reĝo » konata kolego.

Richard KÖNIG el Weiden.

Li estis plena da esperoj kaj planoj kaj troviĝis enmeze de preparoj por kongresvojaĝo al Tarragona, kiam li neatendite estis vokita al alia mondo.

Li ripozu en paco.

A la familio ni sincere kondolencas.

— Nur nun ni eksciis, ke longjara membro de la grupo Bielefeld

Ernst MEIRICH

mortis en aĝo de 76 jaroj jam en julio 1973.

— En Offenbach perdis nia membro Otto F. DENK post longjara terura malsano komence de majo 1974

Sian ezinon Grete.

Jugoslavio

La 20an de februaro 1974 mortis en Zagreb en aĝo de 55 jaroj longjara membro

Rudolf VAJDIC

Ni konservu al ĉiuj bonan memoron!

(Resumo kaj Komentario pri la Jar-raportoj)

Sekvo de la paĝo 45

Danlando — DSB konsentis eks-trajn liber-tagojn al LKK, senpagan ekskurstrajnon, helpis por fakprelego.

Hungarujo : Fervoja kuracista fakrevuo publikigis resumojn de artikoloj en Esperanto.

Japanujo — Starigo de statuto kaj regularoj. Riĉa jarprogramo.

Italujo : Delegacio al IFEF-kongreso la unuan fojon ricevis krom-libertempon. Gravaj klopodoj de IFEA-membro sur politika tereno, por enkonduko de Esperanto ĉe « Internacio de Socialistoj ».

Polujo — Kursoj en Fervoja Teknika Lernejo kaj Eduka Centro por Fervojistoj en Gdansk kun 30-40 partoprenintoj.

Rumanujo — Instruado de 300 gelerntoj per koresponda kurso. Esperas eldoni 1974 multobligitan vortaron. Instruas aktorojn de ŝtata drama teatro.

Svedujo — Kreis reton de 11 « kontaktuloj » en la tuta lando, kiuj helpas propagandi kaj servas per informoj al estraro.

Svislando — 14a Eŭropa FERIA-Sema-

jno sur FÜRIGEN kun 82 partoprenintoj el 12 landoj.

Tiu koncentrita resume kreigis el 29 paĝoj da raportoj. Kun du esceptoj la verkintoj de tiuj landaj raportoj meritas dankon kaj gratulon; ili faris seriozan laboron. La kreinto de tiu-ĉi verkaĵo esperas, ke vi ne kontentiĝu per legado de tiu resume, sed ke vi dediĉu 2 - 3 horojn pli por enkapigi al vi ankaŭ la enhavon de la unuopaj raportoj, ili donos al vi konsilojn por agadi favore al niaj movadoj kaj IFEF.

Pardonu, se iu(j)n erojn el via raporto vi ne retrovas ĉi-tie aŭ se ili ne estas sufiĉe akcentataj. Kulpas parte la spacmanko, parte la malfacilaĵo pezi dumjarajn akiraĵojn.

Romanshorn, 22-a de aprilo 1974.

O. Walder.

La Redaktfino por la venonta IF estas 15-7-74

Presejo : Editions Polyglottes
232, rue de Charenton
75012 Paris - Francio